ĉiam ankoraŭ memoras, ke ili iam sidis agrable kaj kontente vespere en varma orienta vento, kiu, ne nigre kaj ne konstateble, transportis trans miloj de kilometroj el Ĉernobilo nuklee kontaĝan aeron okcidenten.



Bildo 2 : Ĉu nuklea katastrofo?
(ambaŭ bildojn fotis la aŭtorino)

Por germanaj bonvolemuloj ja estos kontentige kredi, ke ilia lando estas sennuklea. Sed ili tute ne volas konsideri, ke ĉirkaŭ ili, mallongadistance al la propraj landlimoj, nehalteble kreskas la radia arbaro de atomaj centraloj, kamentuboj kaj malsekuraj deponejoj. Tiu industrio jam ĝojas liveri sian radian elektron al la senradia Germanujo, kaj jam scias, ke okaze de avario la sennuklea najbaro same suferos.

Adreso de la aŭtoro
Rita RÖSSLER-BUCKEL
Am Mönchsbusch 6
DE – 67373 Dudenhofen / GERMANUJO
<rozsas@web.de>

Priaŭtora informo

La aŭtorino, profesia muzikinstruistino, desegnas, pentras, fotas kaj utiligas kadre de sia artmetio nuntempajn elektronikajn rimedojn. Pli ol cent naciaj kaj internaciaj ekspozicioj agnoskas ŝian verkadon.

La plureco de la plantonomoj
– Respeguliĝo de la biodiverseco vegetala –

Maria BUTAN

Resumo

La surpriza riĉeco de la terminoj, kiuj nomas la plantojn, instigis nin analizi (pri aro hazarde elektita el la spontana flaŭro) unuflanke la reciprokan influon inter la scienca kaj la popola nomado kaj, aliflanke, la morfologiajn elementojn aŭ la fiziologiajn detalojn, kiuj gvidis al la elekto de iu aŭ alia nomo en la rumana kaj la franca lingvoj. Ŝajnis al ni interese substreki la ekziston en la franca de intera kategorio inter la scienca nomo latina kaj la ĉiutaga. Fine, ni cedis al la tento de la onomastiko, kaj ni konsideris oportuna proponi la terminon "fitonimo" – tiel por la komunuzaj kiel por la sciencaj nomoj de protektataj plantoj.

Enkonduko

La vegetala komponanto de la medio alprenas multegon da formoj. La biodiverseco kun siaj periodoj de multiĝo, de stagnado aŭ de malpliiĝo retroveblas respegulita same en la neatendita riĉeco de la terminoj kiuj signas la plantojn. Pro la fakto, ke ni renkontas ilin en ĉio kio ĉirkaŭas nin – en la spontana flaŭro, en la kultivejoj same en la ĝardenoj, kiujn ni kreas kaj ordigas sekvante celon – la plantoj ĉie ĉeestas.

Oni atribuis al ili multnombrajn nomojn kaj tio pruvas la fakton, ke la homo donacis al ili pli da atento ol al aliaj vivaĵoj. Kontraŭe al la ĉiam moviĝantaj bestoj, la plantoj povas esti kontemplataj. Se la bestoj lasas sin studi, precipe koncerne iliajn kutimojn, teniĝojn aŭ iliajn rilatojn kun la homo, la plantoj siavice staras senmove, atendas ĉiam en la sama loko ke la homo venu admiri ilin. La promenadoj en la naturo, celante plezuron aŭ motivitan kolektadon, rekompencas nin per multkolora, refreŝiga rikolto. Kiam oni sekvas la padojn, oni haltas ravitaj de la koloro de petaloj, de la svelteco de tigoj, de la beleco de formoj; oni povas strebi, kiel vera

fitogeografo, listigi la ĉefajn plantojn de senarbejoj, de bordorandoj aŭ, laŭvice de la supreniro, tiujn de pendantaj rokoj aŭ torentoj. Tia klopodo lernigas nin, kiom riĉige estas bone observi kaj ekkoni la naturon. Sed niaj praavoj jam faris tion antaŭ ni, kaj ni estas jam influataj de ilia iniciato.

Certe, kiam ni studas iun planton, nia admiro leviĝas ankaŭ el la konstato (eĉ senkonscia, sed intermiksita en nia juĝado), ke ĝi meritas vere sian nomon. Se la kialo, pro kiu iu planto nomiĝas tiel, ne plu estas sufiĉe travidebla por ni, ni klopodas kompreni kaj trovi la kaŝitan kvaliton aŭ la detalon, kiu generis tiun nomon. Kiam la homo sentis la bezonon nomi (ĉar oni proprigas al si tion, kion oni scias nomi) la hazarda baptanto estis ravita de unu el la elementoj, kiuj konstituas la tuton de la planto, la elemento kiu frapas, la elemento, kiun nia vidpovo, nia flarsento aŭ nia tuŝsento registras. Pro tio, ke nenia planto estas nenomebla, tiu, kiu baptis ĝin, uzis sian tutan imagopovon, helpan certe de tio, kion la planto mem sugestas al li: ĉu aspekto, ĉu parfumo, ĉu koloro.

1. Kelkfoje la baptado de iu planto volis esti **ofero al iu eminentulo:** *Allyssum borzeanum*, planto de la regiono *Agigea* / Rumanio, elvokas la fondinton de la unuaj rezervejoj de la biosfero de la montaro *Retezat* (*Alexandru Borza*), *Tulipa billietiana* estis dediĉita al la kardinalo *Billiet*, prelato de *Maurienne*, pasia por botaniko. En la sama serio, *Tulipa didieri* estas la tulipo de *Didier*, *Tulipa gesneriana,* la tulipo de *Gesner* ktp.

2. Sed antaŭ la botanikistoj, la hazarda baptanto **pensis pri la sanktuloj,** jen ĉar tia planto floras en la periodo, kiam oni festas la repektivan sanktulon: *Sânzâiene, sânjuane – Herbe de Saint Jean*, *Sângiorgel – Herbe de Saint Paul*, *Herbe de Saint Pierre*, *Herbe de Sainte Claire*, *Herbe de Sainte Madeleine*, jen ĉar la planto elvokas iamaniere la vestaĵajn apartaĵojn **"***Laurier de Saint Antoine"*, estas la epilobio, kiu similas al la bastono de la sanktulo.

3. **La mitologio** ĉeestas ne nur pro la konkretaj similecoj: *Casque de Jupiter*, *Barbe de Jupiter* (*Anthyllis barba-jovis*), *l'Andromède* (*Andromeda polifolia*), sed ankaŭ pro kialoj malfacile esploreblaj: *Pecetea lui Solomon* (la sigelo de Solomono). En la

franca fitonimio oni uzas ankaŭ inventitajn sanktulojn: *Sainte-Neige* (por *Cynodon dactylon*) aŭ *"Herbe de Saint-Fiacre"*, *"Oreille de Saint-Loup"* (por *Verbascum thapsus L.*).

Interesa esploro rimarkigis al ni la reciprokan influon, kiu manifestiĝis inter la scienca latina nomo kaj la popola nomo. Certe tiu lasta estis la unua kiun oni atribuis al la plantoj por diferencigi ilin rilate al multaj apartaĵoj, kiuj dependas de ia ĉiutaga "impresionismo". Sed, dum malfruaj etapoj, la latina nomo estis reprenita fare de mezkleruloj kaj/aŭ rekte tradukita, aŭ adaptita. Sed se ni revenas al la unuaj pilgrimantoj en la naturo kiujn ĉarmis la allogaj paŝtejoj, bonodorantaj, multkoloraj, alkroĉiĝantaj; memkomprenebleili reagis al tia ĉeesto de la flaŭro, atribuante al ĉiu vegetala fratino nomon kiun la komunumo fiksis des pli solide, ju pli bone ĝi estis elektita.

4. Ŝajnis al ni, ke **la koloro** ĉefe influis tiun elekton, ĉar la vidpovo estas la plej impresiĝema el niaj sentoj. La latinaj nomoj kaj la popolaj iras kune: *Festuca rubra L.*, *Lamium album*, *Lupinum albus*, *Veratrum nigrum*, *Vicia argentea*, *Querquus rubra*, *Sambucus nigra*, *Melandrium album* kaj en la sama serio, rumane: *păius rosu* (ruĝa), france: *ortie blanche*, *lamier blanc* (blanka), *Veratre noir* (nigra), *Urzica alba*, *Opaița alba* (blanka). Por tiu lasta ŝajnis al ni interese rimarkigi, ke la planto meritas la nomon de "kompano" – ĉar ĝi troveblas de la Norda Afriko ĝis Siberio, kaj de Skandinavio ĝis Malgranda Azio. Ni konsideras same la rumanan terminon *"opaița"* ege taŭga, ĉar ĝi signifas "oleokandelo", kiu estis vere fidela kompano.

5. Por **la formo, strukturo, aspekto** kaj la **impreso** se oni tuŝas la partojn de iu planto, la aro de la nomoj elektitaj konsistigas el protektataj plantoj sur diversaj areoj de Francio, Rumanio aŭ aliteritorie. La folioj estas la unuaj kiuj diferencigas plantojn: *Drosera rotundifolia*, *Tulipa planifolia*, *Bellevalia trifoliata*, *Plantago lanceolata*, *Anemona trifolia*, *Asperula hexaphylla*, *Paris quadrifolia*, *Carex vaginata* kaj en la sama vico: *"Rossolis à feuilles rondes"*, *"Tulipe à feuilles planes"*, *"Bellevalia trois feuilles"*, *"Anemone trifoliée"*, *"Asperule à feuiles par six"*, *"Parisette à quatre feuilles"*, *"Morelle à quatre feuilles"*, *"Laiche à feuilles engainantes"*. Poste, la floro rolas kiel apartigilo: *Triglochim laxiflorum*, *Centaurea corymbosa*, respektive *"Troscart à fleurs*

laches", "centaurée en corymbe", same kiel – siavice – la frukto: *Geum heteroscarpum, "Benoite à fruit divers".*

Koncerne la **tuŝsenton** la plantoj povas esti: *Verveine rugueuse* (raspa), *Soldanelle poilue* (harkovrita), *Silène velouté* (velureca), *Verbena rigida, Soldanella villosa, Silène velutina,* aŭ ankaŭ *Silène mollissima.* La ĝenerala aspekto rilatas **aŭ pri la dimensio**: *Betula nana, bouleau nain, pin pitic,* **aŭ pri la teniĝo**: *pin strâmb, cetina strâmbă* **aŭ pri aliaj elementoj**: *Prunus spinosa, Corydalis cava, Ruscus aculeatus* (dorna).

6. Kelkfoje ni ripozas en senherbejo kun fermitaj okuloj kaj tiam alia sento vekiĝas. Estas nia flarsento kiun invadas **la parfumo** *Anthoxanthum odoratum, Viola odorata, Asperula odorata, iarba fânului, violette odorante, tămâioară,* aŭ eĉ nia **gusto**-kapablo se ni aŭdacas maĉi folion: *Polygonum hydropiper, Oxalys acetosella, "Piperul-apelor", "piper de bălti", "măcrisul iepurelui", "surelle"* elvokas tiun acidan saporon.

7. Ni povas paroli ankau pri **la sinteno de la planto** rilate al ni, sekve de niaj agoj: *Armeria pungens, Mimosa pudica* aŭ laŭ la influo de la aliaj naturelementoj: *Salvinia natans, Trapa natans,* naĝantaj plantoj, treniĝantaj plantoj: *le Blé rampant, Laiche rampante, pinul târâtor,* aŭ kiu turniĝas por kapti la sunradiojn: *le tournesol.* Aliaj, ege "societemaj" volas reteni nin aŭ senmovigi aliajn plantojn: *cleiul, turița* (*Gallium aparine*), *lipici, lipicioasa* (*Silene italica*).

8. Ia **simileco** kun konataj aĵoj influis ofte la nom-donadon por plantoj. Iafoje ili elvokas aliajn plantojn: *Acer platanoides, Ambrosia artemisiefolia, Carex hordeistichos, Telene linifolia, Sternbergia colchiciflora,* respektive la *laiche en épis d'orge, rogozul, le genet à feuilles de lin* kaj la *sternbergie à fleurs de colchique.* Sed la plejmulto elvokas similecon kun anatomiaj partoj de bestoj: *"Pied d'alouette", "chiendent"* (hundherbo), *"pied de poule", "gueule de loup"* (lupfaŭko), *"gura leului", "limba mielului", "coada cocosului"* (kokvosto), *"barbe de bouc", "Pied de lion", "Patte de lapin";* ĉe kelkaj pri la sama simileco aludas la nomo tiel en la latina kiel en ambaŭ romanidaj lingvoj: *Alopecurus pratensis, Astragalus alopecuroides, Erodium cicutarium, Carex ornithopodioides, Veronica serpyllifolia, Thymus serpyllum,*

Pteridium aquilininum, Fritilaria meleagris, kaj respektive: *"Coada vulpii", "Queue de renard d'Espagne", "Bec de cygogne", "ciocul berzei", "laiche faux-pied d'oiseau", "sopârlița", "serpolet", "fougère aigle", "tulipe-pintade".*

Aparta ekzemplo estas tiu de *Equisetum arvense,* kiu ricevis multnombrajn nomojn **ĉu pro simileco** kun la ĉevalo: *"queue de cheval", "coada calului", "coada iepei", "coada mânzului"* aŭ kun aliaj bestoj havantaj imponan voston: *"queue de renard", "queue de chat", "queue de rat", "coada șopârlei",* **ĉu pro utileco**, la fitonimoj *"peria ursului", "perie urseasca"* sciigas nin, ke la planto estis uzata por frotbriligi kaj poluri metalojn. Cetere en la franca oni konas por la sama kreskaĵo la nomojn: *"Herbe à recurer", "Asprelle",* kaj sekve *"Petite prêle"* kaj *"Prêle des champs".*

9. Pro tio ke la plejmulto de la bestoj ne povas vivi sen la planta mondo, la longa observado de la naturo, de la moroj de promenantoj kvarpiedaj aŭ flugilhavaj gvidas nin al serio de nomoj, kiuj precizigas **kiu manĝas la foliojn aŭ la fruktojn** de la respektivaj plantoj, kiu rondiras ilin, **kiu etendiĝas por ripozi** sur la vegetala lito: *Arctostaphylos uva-ursi, Allium ursinum, Potentilla anserina, "strugurii ursului", "ai ciorăsc", "Ail des bois", "iarba gâstii",* aŭ sen plua rilato al la latinaj nomoj: *"salata mielului"* (ŝafida salato), *"laptele păsării", "laptele câinelui", "poama vulpii"* (frukto de la vulpo), *"Herbe aux boucs"* (herbo de la virkaproj), *"herbe de l'hirondelle", "laitue du chien", "mierea ursului"* (mielo de la urso), *"cerga ursului", "țolul lupului"* (kovrilo de la lupo), *"piperul lupului", "iarba șoarecelui"* (musa herbo), *"coada soricelului".*

10. La **simileco kun objektoj** estis siavice grava faktoro en la elekto de nomoj atribuataj al la plantoj. La kolektiva sperto, fajna observado sed kelkfoje ankaŭ decido altrudita de hazardaj elementoj kuŝas ĉe la bazo de la fitonimio. Tiufoje denove la formo de plantaj organoj vekas komparadojn. La floro de *Catalpa bignonioides* pensigas pri muzika instrumento – en la rumana, la nomo estas *"Trâmbițar"* (trompeto); la fruktoj kiuj estas longaj guŝoj naskigis la duan nomon: tiu de "malvera vanilo". Nur la botanikistoj nomas ĝin en la rumana same *"catalpa".*

Polygonatum officinale, kiu jam estas komparata (kiel ni jam

menciis) kun la vosto de koko *("coada cocosului")* nomiĝas same *"Pecetea lui Solomon"* (franclingve: *"Le sceau de Solomon")* ĉar la cikatroj restantaj sur la subtera tigo, post la falo de ĉiu folio similas al sigeloj. *Viola odorata* estas ofte nomata ne pro la parfumo, sed denove laŭ la formo de la floro kaj de ĝia pedunklo: *"Toporaş", "Cârligel"* (hakileto, hoketo).

Aconitum napellus estis vidita de la popola bildigo unuflanke kiel *"Casque", "Capuchon", "Capuce de moine", "Coqueluchon",* aŭ kiel *"Sabot", "Pistolet"* kaj eĉ *"Sabot de Pape"*; aliflanke, dume, apud la scienca nomo *Corydale creuse* tiu planto surmetas ankaŭ la nomon *"Ciocănel"* (marteleto) kaj *"éperon"* (sprono) samkiel oni nomas *Aconitum moldavicum "coif"* (kufo), *"iarba coifului"* (herbo de la kufo), *"iarba fierului"* (herbo de la fero) .

Alia vere interesa ekzemplo, kies analizo referencas ne nur al la lingva historio sed ankaŭ al transdonoj, pruntepreno j, leksikaj interferencoj, estas tiu de *Viburnum opulus*, kiu iam devis esti nomata en la franca *"Boule de neige"*, ĉar en la rumana oni pruntepreni s ĝin tiaforme, antaŭ jarcento; hodiaŭ regiona variaĵo atestas ĝin kiel: *"buldenaş", "buldănaş"*, evidente tio estas la franca nomo apenaŭ transformita laŭ la rumana prononcmaniero.

La herbejoj abundas je *"Bănutei", "Părăluţe"* (moneretoj), blankaj aŭ ruĝetkoloraj floretoj havantaj formon de malgranda monero kiuj ĝojigas longtempe la vidon, do vere indas porti la sciencan nomon *Bellis perennis*. Admirante ilin, restas al ni malkovri la meĥanismon danke al kiu *Alchemilla vulgaris* povis esti nomata *"le Mantelet des dames"*.

Kelkfoje la superega aspekto de iu planto ne ebligas hezitmomenton. La decido estis unuanima ĉe la baptado de *Saponaria officinalis*. La sapeca ŝaumo kiun ĝi ellasas kiam oni frotas ĝiajn foliojn, alportis al ĝi multegon da variantoj, vario sur tiu unika temo: *"Saponiere", "Savonaire"* (kun la alternado de la konsonantoj p→v), *"Herbe à savon", "Savon de fosse"* kaj en la rumana *"Săpunarita", "Săpunel", "Săpunul popii"*.

Koncerne *Capsella bursa pastoris* , la unuvoĉeco en la elekto instigas nin demandi nin, ĉu vere la saketo kiun la paŝtistoj portis estis tiom grava kaj konata de ĉiuj? Ĝiaj popolaj nomoj iras de la simpla *"Bourse"*, al la diminutivo *"Boursette"* ĝis *"Bourse à berger"* kiam la franca lingvo emancipiĝis disde la latina influo.

Veras ankaŭ ke de tempo al tempo, tiu kiu portas tiun saketon ne plu estas paŝtisto, sed monaĥo aŭ eĉ perfidulo: *"Bourse de capucin", "Bourse de Judas"*. La rumana lingvo pravigas la similecon de ties frukto kun malgranda sako por motivi la variantojn: *"Traista ciobanului", "Straiţa ciobanului", "Punga popii", "Punga babii"*, malsuprenirante poste al diminutivoj: *"Pungulita", "Tăscuţa", "Tăsculiţa"* .

Se aliaj elementoj au komponantoj ne estis sufiĉe distingeblaj, sufiĉe kapablaj altiri la atenton rilate la formon, koloron, parfumon, troviĝas riĉa kategorio de plantoj, kies fitonimoj estis elektitaj funkcie de la periodo de ilia florado, momento dum kiu tiuj plantoj indas esti admirataj en sia plena pompa brilo: *Convallaria majalis, Chelidonium majus, Antirrhinum majus* pruvas ankoraŭ unufoje ke la monato majo meritis plene la nomon *"Floreal"* kadre de la franca revolucia kalendaro, kaj tiu de *"Florar"* en la rumana tradicia kalendaro.

La jartempoj siavice ne mankas el la nomoj de la plantoj: *"Spiranthe d'été", "Jacée de printemps", "Printanière", "Primevère", "Fleur de printemps",* por *Primula veris* aŭ *"Fleur de Pâques", "Pâquerette vivace", "Păscuţe"* por *Bellis perennis*; dume *Helleborus purpurascens* ĝojigas nin fine de la frosta jartempo, kelkfoje kiam la neĝo ne fandiĝis ankoraŭ; sekve oni rekompencis ĝin per la bela nomo de *"Rose d'hiver", "Rose de Noel"*.

11. La **origino de plantoj** aperas konstante inter la argumentoj kiuj surpezas favore al iu aŭ alia elekto. Unue ni havas la endemiajn plantojn kiuj devas jam per sia nomo precizigi la originan lokon: *bujorul de Cazane* (Peonio de Danubaj Kaldronoj), *"Anémone des Alpes", "Aster de Pyrénées"*. Poste ni ricevas informojn pri la urboj, montaroj, regionoj *("Astragale de Marseille", "Micocoulier de Provence", "Pinus banatica"),* landoj aŭ eĉ kontinentoj *("Oeillet de France", "garofiţa Pietrei Craiului", Trollius europaeus, Fraxinus americana, Erigeron canadensis, Cytisus austriacus, Crocus banaticus*).

12. Sed la plej granda diverseco de nomoj ŝajnas esti altrudita de la **utiligo de plantoj kiel kuraciloj** kontraŭ diversaj malsanoj, fakto, kiu pruvas la plej fruktodonan rilaton de la homo kun la vegetala regno. Li utiligis florojn, foliojn, radikojn kiel kompresojn sur la vundoj, tizanojn por kvietigi aŭ malakrigi la dolorojn,

kiel drogojn en la kuracado de diversaj afekcioj. Ekde la resanigistoj de primitivaj komunumoj ĝis la nuntempaj homeopatoj, trairante la miljaran farmakopeon, ĉiuj tiuj kiuj konsciis pri la virtoj, la kuracaj efikoj de la belaj reprezentantoj de la flaŭro, trovis por ili distingajn nomojn por kapabli transdoni al la posteuloj tiun akiraĵon de saĝeco kaj kuraca praktiko.

Memnature veras, ke pluraj plantoj povas utili al la sama celo kaj sekve, la respektiva "herbo" troviĝas en konkurenca posteno kun alia, devas partigi la fitonimon kun ia najbarino de la sama paŝtejo aŭ eĉ kun pluraj. Ne gravas! La ĉefa afero estas bone rekoni la planton, ne fari eraran elekton inter similaj.

- Supozeble, dum jardekoj aŭ jarcentoj *Pulmonaria officinalis* kuracis homojn por pravigi la multnombrajn nomojn, tamen ege sugestajn: *"plămânărică", "plumânărică" , "pulmonariță", "La Pulmonaire", "Herbe à coeur", "Herbe aux poumons"*.

- Krom la ĉiutaga nomo *"Brairelle", "Brayette", "Coqueluchon", Primula veris* estas konata kiel *"Herbe à la paralysie"*.

- *Chelidonium majus* estas la *"Herbe aux verrues", "negelariță", "buruiană de negi", "iarbă de negi", "negeloasă", "buruiană de pecingine"*.

- *Euphrasia rostokoviana* surmetas la nomon de *"Luminet"* kaj *"Herbe à l'ophtalmie" kaj tre ofte oni renkontas same "iarba de friguri", "iarba de junghiuri", "iarba de dureri"* por la nomataj *Capsella bursa pastoris, Geranium pratense, Polygonatum latifolium*.

Pro tio ke la febro estis, kaj ankoraŭ estas simptomo de pluraj malsanoj, la homo testis la kuracajn virtojn de la plantoj. *Centaurium umbellatum* demonstras siajn kvalitojn per la multnombraj nomoj tiel en la rumana kiel en la franca lingvoj. *"Herbe à la fièvre", " frigurică", "buruiană de friguri", "floare de friguri", "rozâ de friguri", "iarba frigurilor"*.

13. Serio de komunuzaj nomoj multobliĝas ofte per **asonanco**, per erara aŭ kvazaŭa **transdonado**, aŭ per **popola etimologio**. Por *Chelidonium majus*, ni troviĝas antaŭ la nomoj: *"Felougne", "Felonque", "Felongène", "Sologne"* – samkiel ĉiu devenas de la alia, antaŭa, aŭ por la sama planto *"Eclaire", "Grande éclaire"*, gvidas al neatendita asociado: *"Saint-Claire"*.

- *Sambucus nigra* estas signita per serio komenciĝanta de *"Grand Sureau"* por alveni al tute surpriza *"Sologne"* tra la aliaj nomoj *Suseau, Susier, Seuillet, Seuillon* sen alia ligo inter tiuj terminoj ol la eŭfonio. La kazo de *Lamium album,* kiu disvolvas unue la serion *Lamier, Lamion* prezentas al ni ankaŭ la variantojn *"Ortie morte", "Ortie maure"*, kie la lasta devenas probable de transskribado "*sui generis*" de la antaŭa termino.

- La plej ilustriva ekzemplo en la rumana fitonimio koncernas *Pinus mugo*, kiun ni rekonas sub la ventumilo de sekvontaj nomoj: *jneapăn, gneapăn, gneapen, jep, jip, jepi, jipel, jip mare, jipuşor, jneap, jneapene, jnep, jup*, ĉiu el ili havanta regionan cirkuladon aŭ estanta jam fiksita danke al la fama toponimo "*Valea Jepilor*" de la *Bucegi*-montaro.

14. Alifanke, diferencigoj, kaj, sekve multobligo de nomoj situas sur la nivelo de **lingvistika tavolo**. Iu nobla lingvaĵo registros: *condurul doamnei* (dama altaŝuo) *pantoful Venerei* (ŝuo de Venero), dum la kampara mondo sukcesis fiksi *papucul doamnei, păpucul vinerei,* ĉar *Sfânta Vineri* (La Sankta Vendredo) de la fabeloj estas pli proksima al la popola imago ol la latina vorto, kiu iĝis klera, dokta: Venuso, Venero.

Unu paralelaĵo de la sama kategorio klarigas por la planto *Becde-grue* (grua beko) la rumanan serion sufiĉe diversigitan: *ciocul berzei* (beko de la cikonio), *clonțul cocostârcului, pliscul cucoarei* kaj invitas nin noti la francajn nomojn tre "kamparanajn", tio estas: *Etrangle-loup, Tue-loup, Soubeirette, Toute-bonne, Janne trole*.

La fonto estas neelĉerpebla kaj la subjektiveco, kie trovas sian lokon kaj la poetiko, kaj la ironio, kaj la strangeco, donas al ni la pruvon de la homa inventemo. Ni prijuĝu: *Narcissus poeticus Silene coeli rosa* (*Silène d'un rose celeste*). *La langue de femme* apude de *l'Amourette* por la sama *Briza media*, aŭ *limba soacrei* (la lango de la bopatrino) same kiel *Casse-lunette, Porte-rosée, Réveil-matin* por respektive *Euphrasia rostkoviana, Alchemilla vulgaris, Stellaria holostea.* Nia pledado por pli senĉesa, intensa atento dediĉenda al la fitonimio, tiom riĉiga, eliĝis el nia miro kaj agrabla surprizo antaŭ tia diverseco kaj devenas el la scivolemo kompreni ties motivadon – kaj el la konstatado, el la certeco ke ekzistas kaŝita ligo inter la naturaj kreaĵoj kaj la homaj. La biodiv-

erseco vegetala generis diversecon de fitonimoj praktike senfinan. Ni elmontras kiel lastan demonstradon la nomojn de du plantoj el la plej komunaj, kie la sinonimaj serioj kongruas kun la klasifikado de argumentoj, de influoj aŭ motivaĵoj de la elekto, kiujn ni supre provis starigi.

Hypericum perforatum:

- **formo, aspekto**: *Millepertuis commun, Herbe à mille trous, Herbe percée, Trascalan perforé;*
- **utiligo**: *Herbe aux piqûres, Chasse – diable, pojarniță, sănitoare;*
- **popola etimologio**: *sunătoare, floare de foc viu, Trucheron jaune, Crugie;*
- **periodo de la florado**: *Herbe de Saint-Jean, Iarba Sfântului Ioan.*

Taraxacum vulgare:

- **simileco al bestoj**: *Dent de lion, Liodent, Coq, Groin de porc;*
- **simileco al aliaj plantoj**: *chicorée, cicoare;*
- **kiu serĉas ĝin**: *Salade de taupe, Laitue de chien;*
- **simileco al objektoj**: *Couronne de moine, Florin d'or.*

Rilate al la protektado de tiu abunda biodiverseco, malavara, ni devus rezigni pri la emo kolekti, rompi, detrui, ĉiufoje kiam malbona kutimo vekiĝas en ni: alproprigi tro facile tion, kion oni konsideras "sovaĝa" – tio signifas "kio apartenas al neniu".

Bibliografio

Borza Al. (1968). Dicționar etnobotanic, Cluj.
Cabaret J. (1986). Plantes pour soigner les animaux, Ed. du Point Vétérinaire.
Danton Ph. & Baffraz M. (1995). Inventaire des plantes protégées en France, Ed. Nathan, Paris.
Diaconovich C. (1896, 1900-1906). Enciclopedia Română, Ed. Astra, Sibiu.
Larousse de la langue francaise, 1979, Lexis, Paris
Macrea D. (1958). Dicționarul limbii române moderne, Ed. Academiei RPR.
Simionescu I. (1973). Flora României, Editura Albatros.
Triska J. (1987). Flore d'Europe, Paris.

Adreso de la aŭtorino

D-rino Maria BUTAN
Aleea Ripensia 34 ap. 3
RO 300-585 Timişoara
RUMANIO

<butan_osiek@yahoo.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesorino pri la franca lingvo, instruis en la Beletra fakultato de la Universitato de *Timişoara* kaj poste en la Universitato pri Agrikulturaj Sciencoj de Banato, Rumanio. Doktoriĝis 1995 en Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj estas *PDoc.*

Asbesto – eterna koŝmaro

Martin EBNER

Asbesto estis la favorata materialo de la industria epoko.
Hodiaŭ la venena polvo kaŭzas timon kaj teruraĵn kostojn.

"Atentu! Tio estas anonco de la biblioteka direktorino: Bonvolu tuj forlasi la domon! Atentu! Tio ne estas ŝerco..." Post trovaĵoj de asbesta polvo la biblioteko de la universitato en la germana urbo *Konstanz* estis evakuita dum duona horo. Librobretarojn nun atingas nur laboristoj kun protektvestoj kaj vizaĝmaskoj. La kolektado de asbestaj fibroj daŭros ankoraŭ monatojn. Tiamaniere materialo rememoriĝas, kiu iam promesis sekurecon kaj prosperon, sed hodiaŭ disvastigas timon kaj teruron.

Per la greka vorto *asbestos* (neestingebla/nedetruebla) oni nomas diversajn fibroformajn silikatajn mineralojn, kiujn oni kutime subĉiele ekspluatas. En Okcidentgermanio oni precipe prilaboris ĥrizotilon* (blanka asbesto) el la mineĵo de la konzerno "*ETERNIT*" en la kanada provinco *Quebec*, pli malofte ankaŭ la eĉ pli danĝeran krokidoliton* (blua asbesto) el Sudafriko. En Orientgermanio dum mallonga tempo oni ekspluatis trovaĵojn en la provinco Turingio, sed precipe la slabokonstruaĵoj de la iama DDR enhavas ĥrisotilon el la rusa urala regiono.

En la jaro 1905 la aŭstra inventisto *Ludwig Hatschek* ricevis patenton por eksterordinare konservebla miksaĵo de cemento kaj asbesto, kiun li baptis "*Eternit*", laŭ la latina vorto "*aeternus*" (t.e. "eterna"). Ekde tiam oni prilaboris la plej grandan parton de la vendita asbesto en tegmentplatojn, akvokondukilojn kaj aliajn cementajn produktojn. Tamen la materialo, kiun oni laŭdis kiel "mineralon de mil ebloj", povas multe pli: Asbesto ne brulas, ne rustiĝas kaj ne putras. Ĝi estas malpeza kiel aluminio, sed pli tiro-

* La plej gravaj specoj de asbesto nomiĝas *Chrysotil* kaj *Krokydolith* en la germana lingvo. Ni uzis por *Chrysotil* ne la PIVan "krizotilo" sed "ĥrizotilo" (laŭ la propono de *Kavka* en SR 1/2003 "Scienca Vortaro", p.32) kaj esperantigis *Krokydolith* al "krokidolito".